Sur pago 36: Kion pensas pri tio ĉiulandaj esperantistoj?

Cena numeru 50 groszy.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.
Jarabono: en Polujo 6 złoty, eksterlande samvaloro de 6 orfrankoj.
La Redakcio ne resendas manuskriptojn; konservu kopion.

Redaktoro kaj Eldonanto:
STANISŁAW KAROLCZYK.

Subtenantoj:
Prof. Dr. ODO BUJWID
JAN KOSTECKI
Dr. EMILJAN LOTH
WŁODZIMIERZ MIERNICKI

ENHAVO:

Jan Kostecki: Nia Sesa en Warszawa. — VI Kongres Polskich Towarzystw Esperantystów i Polskich Akademickich Towarzystw Esperantystów. — Kion pensas pri tio ĉiulandaj esperantistoj? — A. Niemojewski: Tammuz kaj Iŝtar (trad. Włodz. Pfeiffer). — Eska: Mi dankas la vivon. — Nia Pollanda kroniko. — Miesiąc esperancki. — Gazetoj kaj libroj. — Sprostowanie.

JARO XIX. WARSZAWA — Marto № 3 (113)

Zebrania Polskiego Tow. Esperantystów w Warszawie (Królewska 19) odbywają się co środa od 8 do 10 wiecz., zaś kancelarja i bibljoteka czynne są we poniedziałki i środy od 7½ do 9 wieczór.

Niaj subtenantoj.

Nia gazeto, far.ĝinta en la pasinta jaro pivata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas tamen, almenaŭ en la komenco, la bonvolan materialan helpon de tiuj polaj Esperantistoj, al kiuj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ju pli da subtenantoj anonciĝos, des pli enhavoriĉa, luksa kaj des pli efika estos la „Pola Esperantisto",

unika esperanta revuo por Poloj.

La nomaron de la subtenantoj ni ĉiam presos sur la unua paĝo de la kovrilo.

Fariĝi subtenanto de „Pola Esperantisto" povas ĉiu persono, kiu enpagos monate po Zł. 20.—

Subtenantoj ricevas sen plua pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldono de

„Pola Esperantisto"

Widok 19, Warszawa.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XIX. WARSZAWA — Marto № 3 (113)

NIA SESA EN WARSZAWA.

La VI Kongreso de Pola Esperanto Asocio okazos denove en Warszawa, dum la Pentekosto (30 a majo ĝis 1 a junio). Ĝin ne akompanos tiufoje II Tutpola Kongreso, ĉar la Varsovia Intersocieta Delegitaro opiniis, ke ĝis venonta jaro ne estos ankoraŭ matura la solvo de problemoj, pri kiuj ĝi devas okupiĝi. Estas tamen eble, ke samtempe kun la kongreso de nia asocio okazos konferenco de ĉiuj pollandaj societoj. Tiun eblecon mi nun detale ne priparolos, ne dezirante tro frue diskonigi tion, pri kio devas decidi la Intersocieta Delegitaro.

La venonta VI Kongreso de P. E. A. havos alian karakteron, ol la lastjara V Kongreso. La Kvina okazis en tute specialaj cirkonstancoj. Post longa interrompo estis tiam fonditaj unuaj ligiloj inter diversaj „partioj" de nia landa movado. Ni deziris aŭdi ĉiujn polajn esperantistojn, ni deziris paroligi ilin. Tial ni lasis plenan liberecon al ĉiu starigi proponojn, eĉ dum la kongreso mem. Tial ni donis eĉ al ĉiu ne-membro, partopreninta la kongreson, la voĉdonrajton egalan al tiu de niaj membroj. En esperanta Rondo Familia, sen ia ajn diferenco iaspeca, ni priparolis ĉion, kio interesas la polan esperantistaron. Ni konas nun niajn vidpunktojn, ni fiksis diversajn taskojn plenumotajn, ni povas ĝuste esperi, ke pluaj konferencoj aŭ kongresoj, tutpolaj gvidos ilin al feliĉa fino. Ni rajtas ankaŭ diri, ke nia asocio bone plenumis sian devon doni la unuan signalon, fari unuan paŝon sur la vojo de konkorda, amika kunlaboro kaj interhelpo.

Sed tie la speciala rolo de Pola Esperanto Asocio finiĝis. Ekzistas en Polujo diversaj nacioj, diversaj sociaj klasoj kun siaj apartaj celoj. Ni nek volas, nek povas

okupiĝi pri tio, kio kreskas ekster nia agadkampo. Tiu agadkampo ja estas: *interne* — propagandi Esperanton inter Poloj, sen ia ajn diferenco aŭ nuanco klasa; *ekstere* — konigi kaj komprenigi la polan fraton al aliaj anoj de la granda homara familio.

Nia VI Kongreso trans tiujn limojn ne eliros. Ĝi okupiĝos *nur* pri la aferoj de la Asocio. P. E. A., disvolviĝanta en kelkaj lokoj tre vigle kaj rapide, en kelkaj aliaj montras iom da maljuneca falo. *Ripari la breĉojn en nia ŝipo* — jen unika problemo, pri kiu ni meditos nunjare.

Nia metodo estos tre simpla — tiu de la bona sperto. De kie la esperanta propagando bolas ni petos nian konsilon. Junaj, fervoraj grupoj faros antaŭ ni ekspozicion de siaj rimedoj kaj manieroj. En detalaj raportoj pri la propagando niaj ĉefaj propagandistoj donacos al ni la saĝon de siaj personaj eksperimentoj.

Sed, ke la kuraciloj efiku, estas necese, ke ĉiu Grupo prezentu al ni kiel eble plej ekzaktan bildon de sia vivo, de siaj mankoj kaj gajnoj. Tial ni substrekas kaj atentigas: *ĉiu Grupo zorge preparu la raporton.*

En nia kongreso unuafoje partoprenos ankaŭ *Polaj Studentaj Esperantistaj Societoj.*

Kvankam pro specialaj kaŭzoj, pro granda facileco de propagando sub tiu formo inter la studenta junularo, ĉiam tiel bone kaj agrable kunvivanta kaj kunlaboranta, ili estas aŭ estos apartaj organizoj — ilia celo tamen identiĝas kun la nia. Studentoj ne estas klaso, same kiel scienco ne limiĝas al ia homa grupo. Tial en nia programo kuniĝas nin ĉio, kaj dividas nin nenio.

Sekve, kun granda plezuro la Centra Estraro de P. E. A. akceptis la proponon de fortike kreskanta varsovia Pola Studenta Esperantista Societo, kiu oferis sian partoprenon kaj kunhelpon en la organizado de la kongreso. Ni povas nun esti certaj pri ĝia plena sukceso.

Ĝenerale, ni, malnovaj esperantistoj en Warszawa, sentas nin tre strange de ia tempo. Vi eĉ ne imagas, kiom tiuj junaj fraŭlinoj kaj sinjoroj jam faris kaj faras konstante por Esperanto! Antaŭe ni naive kredis, ke ni mem ion kapablas; nun, kun ĉiu tago fariĝas al ni pli klare, ke ni estas tipoj, taŭgaj por plenŝtopo kaj elstarigo en muzea fenestro.

Kian balon, ekzemple ili aranĝis antaŭ kelkaj tagoj! En la luksaj salonoj de *Resursa Obywatelska*, kiu, de kiam en Warszawa ekzistas esperantistoj, neniam aŭdis ion pri Esperanto — nune flirtis fiere niaj standardoj, premiĝis gaja multcenta amaso, brilis verdaj steloj — kaj fine venis ankaŭ

la gastinta en nia ĉefurbo, jugoslava studenta ĥoro „Obilić," kiu ne havante en sia rondo eĉ unu esperantiston, devis neordinare miri pri tia potenco de la stranga esperanto-movado en Polujo!

Prezidanto Trochimowski salutis ilin pole kaj esperante, sed ili, malfeliĉuloj ne konante tiujn lingvojn, povis nur mute montri al ni s an simpation, dancante la nacian „Kolo."

Do, mi ripetas, ni estas certaj pri bona aranĝo de la kongreso. Nur vi ĉiuj en la provinco plenumu vian devon.

Aliĝante rapide, venante multnombre el ĉiuj partoj de la lando, pruvu al la juna mondo esperantista, ke ankaŭ vi vivas kaj laboras!

Jan Kostecki.

VI Kongres Polskiego Towarzystwa Esperantystów i Polskich Akademickich Towarzystw Esperantystów.

Warszawa, 30, 31 maj, 1 czerwiec (Zielone Świątki) 1925 r.

KOMUNIKAT I-szy.

KOMITET HONOROWY: Na prezesa Komitetu Honorowego Komitet Organizacyjny uchwalił zaprosić prof. Odo Bujwida, na członków następujące osoby: p. Stanisława Brauna z Łodzi, księdza proboszcza Nikodema Cieszyńskiego z Poznania, d-ra Ignacego Dziedzica z Torunia, prof. Franciszka Endera z Łodzi, p. Józefa Grygosińskiego z Częstochowy, pułkownika Jana Günthera z Warszawy, redaktora Stanisława Karolczyka z Warszawy, p. W. Kaweckiego z Gdańska, p. Aleksandra Kobylińskiego z Katowic, p. Bronisława Kuhla z Krakowa, d-ra Emiljana Lotha z Pabjanic, prof. d-ra Jerzego Lotha z Warszawy, d-ra Mędrkiewicza Jana z Lublina, d-ra Szczepana Mikołajskiego ze Lwowa, prof. Jana Muszyńskiego z Wilna.

KOMITET ORGANIZACYJNY: Prezes p. Jan Kostecki, wiceprezes P. T. E. Wiceprezesi: p. Mieczysław Trochimowski, prezes P. A. T. E.; Dr. Antoni Czubryński.

Sekretarz Generalny: p. Eugenja Cense
Sekretarz: p. Jan Ferencowicz
Skarbnik: p. Tadeusz Grabowski.

ADRES dla wszelkich przesyłek: Pola Esperanto Kongreso, Warszawa, Leszno 72, m. 3.

Pieniądze należy przesyłać na imię skarbnika p. Tad. Grabowskiego, Warszawa, Leszno 72, m. 3.

Tymczasowy program prac kongresu:

1. Sprawozdanie Oddziałów P. T. E.
2. Referat o metodach propagandy.
3. Wolne wnioski oddziałów i członków.

Komitet uprasza o nadsyłanie wniosków najpóźniej do dnia 1-go maja.

Podczas Kongresu odbędzia się pozatem: Konferencja polskich studentów, egzaminy i posiedzenia poszczególnych sekcyj.

KOMITET ROZRYWKOWY w osobach pp. Włodzimierza Miernickiego, Tadeusza Szomańskiego, Kamilli Łagodzińskiej, Emila Dunkiera, Juljusza Wojciechowskiego, przygotowuje radio-koncert i radio-audycję esperancką, wspólną kolację, raut lub wycieczkę statkiem z koncertem i tańcami, zwiedzanie zabytków miasta, wycieczkę autobusami i t. d.

KOMISJA MIESZKANIOWA poczyniła już starania, aby umożliwić esperantystom z prowincji pobyt w stolicy. Liczni esperantyści z Warszawy zaofiarowali bezpłatnie swe mieszkania. Komisja ma nadzieję zaspokoić jaknajliczniejsze zgłoszenia.

OPŁATA KONGRESOWA została ustalona w następującej wysokości:

1. Uczestnicy popierający . . . 9 zł.
2. „ zwykli . . . . 3 „
3. Ucząca się młodzież . . . . 2 „

KOMITET ORGANIZACYJNY.

Sekretarz: *Jan Ferencowicz.*

Prezes: *Jan Kostecki.*

Warszawa, 27 marca 1925 r.

KION PENSAS PRI TIO ĈIULANDAJ ESPERANTISTOJ?

En Nr. 294 (p. 32) de la ĝeneva „Esperanto“ ape la sciigo, ke *la Centra Oficejo de U. E. A. okazigis voĉdonon pri uzo de landnomoj.*

Tute sendepende de niaj opinioj pri la landnoma demando, konataj al niaj legantoj, la fakto mem ŝajnas al ni *io absolute eksterordinara.*

Kio okazos kun Esperanto, se krom la Lingva Komitato voĉdonos pri lingvaj demandoj diversaj aliaj organizoj?

Facile antaŭvidi. Baldaŭ ni legos en niaj kronikoj

„ETURBET (10.000 loĝantoj). La Centra Oficejo de Eturbeta Esperanto Asocio, fondita hieraŭ (enskribiĝis tuj pli ol 150 anoj!), esploris zorgeme la landnoman demandon. Dezirante kunigi diversajn opiniojn, ĝi per 11 voĉoj (kontraŭ 1 sindeteno) decidis akcepti la sufikson *ej* por ĉiuj landnomoj (ekz.: *Svisejo, Ĉeĥoslovakejo).* La Centra Oficejo instrukciis la Asocion daŭre sekvi tiun principon senescepte".

Esperantistoj! Ĉu vere aŭdiĝos inter vi neniaj voĉoj de protesto, de persvado?

Ĝis nun *ni solaj* faris tion. Se Esperanto devas resti *nur* lingvo, venis tempo, ke helpu nin aliaj!

La voĉdono de la Centra Oficejo de U. E. A. nepre estas nuligota!

La Redakcio.

TAMMUZ KAJ IŜTAR.

De Andrzej Niemojewski.

(Fino).

La nigraj okuloj de l'dio larme ekflagris. Poste li ekspiris kaj diris tre mallaŭte:

— Mi do permesas, iru tien.

Iŝtar falis al liaj piedoj, komencis ĉirkaŭpreni ilin kaj kisi. Kaj Ea staris super ŝi senmova, nur la vizaĝon li kovris en la manoj.

Jen ŝi kuŝas ĉe liaj piedoj kaj kisas ilin. Kaj jen estas ĉio, kion li atingis. Ĉio kaj nenion kaj neniam pli.

Li atingis dankemon, ke konsentis ne esti amata.

Li ekflustris tiam en pensoj:

— Saĝeco estas sufero.

— — — — — — — — —

Iŝtar celas okcidenten, kie subiras la suno. Ŝi migras tien, kie troviĝas la enirejo en la landon de Aralo, regno de senkompata morto, kie estas nokto, kie malĝojo, kie putraĵo.

Jam supre la ĉielo kovriĝis per nigraj nubolavangoj kaj funde siblas per blankaj ŝaŭmoj la rivero Ĥubur.

Sur floso staras Namtur, elsekita, brunkolora, maljunulo senhara kun griza barbo, servisto de diino Allatu.

La ondoj siblas kiel serpentoj. Ili naĝas. Longa strio de ŝaŭmo montras la faritan vojon.

Blovas vento malvarma. Iŝtar sidas senmova kaj la vizaĝon havas decidan.

La floso ekbatas je roka bordo. El la mallumo eliĝas bronza pordego.

Antaŭ la pordego staras Ŝeol, la ŝlosilestro.

Iŝtar ĵetas ormoneron al Namtur, kiu per remilo reĵetas ĝin en la akvon kaj fornaĝas.

Tiam Ŝeol levis la kadavran manon al la kapo de Iŝtar kaj deŝiris de ĝi la kronon.

— Kiel vi rajtas, servistaĉo de nokto, tuŝi mian tempion kaj deŝiri de ĝi la signon de mia povo?

— Nebezona al vi estas nun, filino de lumo, tiu vantaĵeto de dioj!

Ekgrincis la bronzaj duopordoj kaj malfermiĝinte, eligis kanton similan al vento de dezerto.

Iŝtar pasis la pordegon, kiu estis la unua. Kaj jen ŝi iris tra la lando de mallumo, aŭdante sole siajn proprajn paŝojn. Post unu horo ŝi ekhaltis antaŭ dua pordego.

Tie atendis Nedu. Per skeleta mano li deŝiris de ŝia kolo la kolornamaĵon.

— Kiel vi rajtas, kadavro de kadavroj, ektuŝi min kaj deŝiri la talizmanon de mia deveno?

— La diino de Aralo ordonis al mi depreni tiun superstiĉan vantaĵeton de la sunidoj!

Ekgrincis la dua pordego kaj aŭdiĝis voĉo devenanta kvazaŭ de malproksima tondro.

Iŝtar migras tra la lando de korvenigra mallumo, aŭdante sole la spiron de propra brusto. Ŝi ekstaris antaŭ tria pordego.

Tie atendis Gallu, abomena demono. Per fia mano li deŝiris de ŝiaj fingroj la ringojn.

Sed Iŝtar jam silentas, jam ne protestas, jam nur enfermas la koleron en si mem.

Antaŭ la kvara pordego oni deŝiris de ŝiaj brakoj la braceletojn. Antaŭ la kvina pordego oni deprenis de ŝiaj piedoj la ŝuojn. Antaŭ la sesa pordego oni deŝiris de ŝiaj femuroj la zonon per purpuro ornamitan. Antaŭ la sepa pordego oni deŝiris de ŝi ĉiujn vestojn.

Ŝi iris jam ne nur senŝua, sed ankaŭ nuda.

Kaj tuj post la sepa pordego ĉirkaŭigis ŝin la demonoj de Annunako, por depreni de ŝi la du lastajn ornamaĵojn: la belecon kaj sanon.

Tuj komencis alsaltadi ankaŭ aliaj demonoj, por ĵetadi sur ŝin plej diversajn malsanojn.

Alkuris Aŝaku kaj ĵetis sur ŝin febron. Ekflamiĝis la pupiloj de Iŝtar kaj ŝian korpon komencis skui tremo.

Alkuris Rabissu kaj ĵetis sur ŝian haŭton brulvundojn. Dolorigaj flamoj komencis leki la korpon de Iŝtar.

Alkuris Alu kaj ĵetis kanceron sur ŝian bruston. Iŝtar ekŝanceliĝis, ekgrincis per dentoj pro doloro. Obtuza ĝemo eliĝis el ŝia buŝo ŝvelinta.

Alkuris Uttuku kej ĵetis ulcerojn en ŝian gorĝon. Iŝtar komencis stertori kaj sufokiĝi.

Alkuris Labassu kaj ĵetis sur ŝiajn membrojn konvulsiojn. Iŝtar duonfalis je genuoj.

Alkuris Belit-Seri kaj ĵetis sur ŝin lepron. Iŝtar komencis rampi kaj la korpo defaladis de ŝi popece.

Alkuris Lilu kaj ĵetis sur ŝin ostoputradon. Iŝtar spiregante kaj stertorante rampis sur vundiga sablo, per veneno gutante, en unu teruran vundon ŝanĝita.

Alkuris Lilit kaj ekbruligis en ŝia kapo flamojn. Iŝtar sentis alproksimiĝantan frenezon.

— — — — — — — — —

Kaj samtempe supre, sur la tero, en lando Ur-Kasdim, estis velkanta la resto de ĉio kaj la tero en cindron senfruktan disfaladis.

Kiam Iŝtar faris la sepan paŝon, kliniĝis la lastaj irisoj kaj kvazaŭ forbrulitaj falis sur la flavajn herbarojn.

Kiam ŝi faris la sepdeksepan paŝon, elverŝiĝis la akvoj de l'rivero Zabu.

Kaj kiam ŝi plenumis la lastan paŝon, la tero iĝis unu granda morta cindrejo kaj venis aŭtuna diluvo.

— — — — — — — —

Super la rampanta Iŝtar ŝvebas la demono Aŝaku kaj flustras kolera:

— Diru nur la vortojn: „Mi volas reveni!". Kaj vi tuj ĉesos suferi.

Li klinis la abomenan orelon al ŝiaj lipoj kovritaj de ulceroj kaj post momento li ekaŭdis la malrapide kaj abtuze elspiritajn:

— Suferi mi volas...

Klinis sin al ŝia orelo Rabissu kaj ekgrakis furioze:

— Mi deprenos de vi la brulvundojn, diru nur la vorton: „Mi revenos!"

Kaj li klinis la vespertan orelon al ŝia venenita buŝo kaj post momento li ekaŭdis:

— Mi ne revenos...

Ĉirkaŭadis ŝin de ĉiuj flankoj Alu, Utukku, Labassu, Belit-Seri, Lilu, Lilit. Ili grakis kvazaŭ ĥoro de vulturoj kaj agloj.

— Cikatriĝos viaj vundoj, defalos la kancero de via brusto, la lepro ĉesos vin konsumi, vi malsaĝa, diru nur unu, tiun solan unu vorton!

Tiam Iŝtar levis la de krustumiĝintaj vundoj kovritan vizaĝon kaj elstertoris nur:

— Al Tammuz mi volas!

Kiel ekflugas malsatega birdaro fortimigita de besta kadavro kaj forflugas tra la ĉielo per grakantaj amasoj, tiel diskuris en ĉiujn flankojn la demonoj kaj ekregis teruriga silento, mallumo, dezerteco.

Iŝtar rampis plue. Sed komencis en ŝi malfortiĝadi la espero, volo, memoro. Ŝi ne sciis jam, kie ŝi estas kaj kien ŝi celas.

Ŝi jam forgesis, ke ŝi nomiĝas Iŝtar, ke ŝi malsupreniris en la landon de Aralo, ke ŝi devas ĝisrampi al la fonto de l'vivo kaj aspergi per ĝia akvo la ŝtonegon, kovrantan Tammuzon.

Kaj se ŝi ankoraŭ rampis en la direkto difinita, do faris ŝi tion tiel senkonscie, kiel en la templo de Baal ĉe pastro Rebido rampas peceto de metalo al alia peceto, kion neniamaniere oni povas kompreni.

Fariĝis el ŝi unu ulcervolvaĵo. La brulo en ŝia kapo ankoraŭ foje ekflamis kaj estingiĝis. Ekregis en ŝia memoro absoluta nokto.

Nur ŝi ankoraŭ rampis, rampis.

— — — — — — — — —

En ĉi-momento ŝi ekbatis per frunto je ŝtonego kovrita per ŝimo. Ŝi eksentis refreŝigantan malvarmeton. Ŝi ekaŭdis fluon de akvo.

Ŝi etendis la manon en la mallumon. Ŝi trempis ĝin en la akvo kaj poste aspergis la ŝtonegon kaj sin.

De ie supre, de senmezura alto falis radieto de lumo kaj samtempe aŭdiĝis mallaŭta muziko, kvazaŭ bruo de palmoj kaj zumo de insektoj.

Printempa blovo iris tra la spaco. El la aero defluadis balzamoj, fermadis la vundojn de Iŝtar, karesis ŝian korpon per beleco, plektis la harojn.

Nevideblaj manoj surmetis sur ŝin vestojn, sur la brakojn surmetadis braceletojn, surŝovadis ringojn sur la fingrojn, metis la kronon sur ŝian kapon.

Ĉiela revaro plenigis ŝiajn pensojn. Doloro, sufero, malbeleco, vundoj, ĉio malaperis kiel sonĝo forgesita.

Kaj tuj poste la ŝtonplato eligis facilan ekĝemon, komencis disfluiĝadi kiel nebulo kaj disiĝinte, aperis nigra barbo frizita, brusto leviĝanta per vivo kaj voluptemo, okuloj nebulitaj per amo, buŝo malfermita por ekrido.

Kreskas ĉirkaŭe la dolĉa muziko. Vizaĝo kliniĝas super la vizaĝo kaj aŭdiĝas du flustroj de senmezura feliĉo, amo, sindediĉo:

— Iŝtar!

Tammuz!

— — — — — — — — —

Kia jen maro de aromoj eksvingis siajn florajn ondojn? Kiaj jen briloj multkoloraj superverŝas la spacon? Kiaj jen kantoj kaj ekkrioj aŭdiĝas supre super la diskrevita tero?

Tio laŭlonge de Babiloniaj riveroj ĝis la malproksima Ninivo aŭdiĝas milaj ekkrioj de popolo:

— Tammuz reviviĝis!

Du printempaj figuroj, en ĉirkaŭpreno, leviĝas el la malluma abismoj en la lumplenan spacon, ĉiam pli supren, pli supren.

— — — — — — — —

Forkuras la akvoj de vintra diluvo kaj revenas la printempo. Kuntiriĝis Frat kaj Tigro iĝis mallarĝa kiel ora zono de virgino.

La tero Babilonia kovriĝis per anemonoj kaj oleandroj. La aero aromas kiel rozoleo.

La vilaĝano eliras en la kamparon kun grajno. La ĝardenisto subtranĉas la vinberbranĉon. La fiŝisto per manoj kaptas fiŝojn el la akvoj de Zabu.

Printempo, printempo!

Babilonio ŝanĝiĝas je floredeno.

— — — — — — — —

Sur nebuloj lotuskoloraj, zonitaj per ĉielarko, ĉirkaŭitaj de aŭroraj radioj, naĝas la geamantoj en la direkto de Eritu.

— Kie ni estas, Iŝtar amata?

— En lando de vivantoj, printempa amato mia!

— Vi min elkondukis el la lando de Aralo?

— Kisu min, Tammuz!

Vi suferis por mi nudecon, malbelecon, lepron?

— Ĉirkaŭprenu min, kara!

— Kiel vi feris tion?

— Per amo, Tammuz!

— — — — — — — —

Sur la Babilonian florĝardenon rigardas Ea, dio de la saĝeco, rigardas per malgaja okulo.

Li aŭdas la gajecon de la popolo kaj ne ĝojas.

Ĉirkaŭblovas lin maro de aromoj kaj li ne sentas ilin.

Krevas la floro kaj ŝutiĝas la grajno, sed li tion ne vidas.

Ĉar ne al liaj brakoj sin turnos la belega Iŝtar. Ne al lia sino ŝi klinos la voluptan korpon. Ne sur lia brusto ŝi apogos la mirbelan kapon.

Ea batalos kun si mem, sed vane. Li traatendos la someron kaj kiam proksimiĝos la aŭtuno, li diros al si: eble nun!

Kaj ree li forpelos Tammuzon en la landon sen reveno. Kaj Tammuz tamen ree revenos de tie. Ree li opinios, ke ebele tiufoje Iŝtar inkliniĝos al li. Kaj li konvinkiĝos, ke ne.

Tiam suferplena li ree permesos al Ŝi foriri post la riveron Ĥubur. Iŝtar foriros, eltenos la nudecon, nokton, lepron, Ŝi ekĉerpos el la fonto de l'vivo, revivigos Tammuzon kaj mem rejuniĝos.

Ekblovos aromoj, aŭdiĝos printempaj kantoj. Iŝtar per ama ĉirkaŭpreno elsorĉos la amaton el la lando de Aralo, por nova somero, por nova amado. Kaj estos aŭdataj flustroj:

— Iŝtar, vi elportis tion por mi?

— Por vi, Tammuz!

— Eĉ se Ea ĉiujare min forsendadus en la landon, de kie ne estas reveno, vi iros kaj elkondukos min?

— Eĉ ĉiujare mi iros kaj elkondukos vin!

Tradukis Włodzimierz Pfeiffer.

Mi dankas la vivon.

Ne ekkonis mi feliĉon ĝis nune,
domon mian ĝojo ĉiam evitis,
jaroj junaj pasis preskaŭ aŭtune —

kaj se ia min okazo ekscitis
tio certe estis de l'kor' sufero,
aŭ doloro ĝeman krion recitis...

Ne konata al mi estis amkvero,
ĉiam iris mi tra vivo nur sola —
kaj se ia min minacis danĝero,

malgraŭ ke mi ĉiam vivis izola,
min ne kaptis senespero turmenta,
ne karesis ies vorto konsola.

Tamen estas mi de l'vivo kontenta,
ĉar ĝi donis al mi forton magian,
ke mi povas en kvieto silenta

superregi kordoloron la mian
kaj rigardi ĝin nur kvazaŭ fiktivon...
Sorto donis al mi timon nenian

kaj pro tio kore dankas mi vivon.

Beka.

NIA POLLANDA KRONIKO.

En tiu ĉi numero ni komencas regulan publikigon de dulingva kroniko de ĉefaj okazintaĵoj en la esperantista movado en nia lando. Ĝian redaktadon afable prenis sur sin nia juna eminentulo, S° Mieczysław Trochimowski, prezidanto de Internacia Studenta Asocio kaj de Pola Studenta Esperantista Societo en Warszawa.

Kun ĝojo ni bonvenigas lin kore en nia redakcia anaro!

La Redakcio.

Ruch esperancki w Polsce.

Warszawa.

Ruch nasz w Polsce ogromnie się ożywił w bieżącym roku.

Dnia 11 lutego odbyło się Walne Zebranie Polskiego Towarzystwa Esperantystów. Zebranie otworzył prezez prof. Dr. Odo Bujwid, który goraco podziękował obecnym za liczny udział w Zebraniu. Na przewodniczącego wybrano pana Emiljana Lotha.

Następnie przystąpiono do wysłuchania sprawozdania Zarządu, które odczytuje wiceprezes, pan Jan Kostecki. Ogrom pracy przedstawiony na kilkunastu stronach był prawdziwie imponujący. Praca dla Esperanta (wywieszenie afiszów propagacyjnych wraz z Polskim Akad. Tow. Esper., prowadzenie kursów i t. p.), czy też praca nad propagowaniem dorobku kulturalnego Polski po wsze ludy są tego najlepszym dowodem. Oddźwiękiem działalności Zarządu był wniosek prof. Jerzego Lotha, by Zebranie wyraziło swe gorące uznanie ustępującemu Zarządowi.

Pola esperantista movado.

Warszawa.

Nia movado tre reviglîĝis en la kuranta jaro.

La 11 de februaro okazis Ĝenerala Kunveno de Pola Esperanto-Asocio. La kunvenon malfermis profesoro D-ro Odo Bujwid, kiu varme dankis la ĉeestintaron por la multenombra partopreno. Kiel prezidanton oni elektis s-ron Emiljan Loth.

Sekve oni alpaŝis al raporto de la eksiĝanta estraro, kiun legas vicprezidanto s-ro Jan Kostecki. Grandego de la laboro, prezentita sur dekkelkaj paĝoj, estis vere imponanta. La laboro por Esperanto (dispendigo de murafiŝoj propagandaj kune kun Pola Studenta Esp. Societo, gvidado de kursoj ktp.), aŭ la laboro je propagandado de polaj bonkulturajoj al ĉiuj popoloj estas la plej bona argumento. Resono de agademeco de l'Estraro estis propono de prof. Jerzy Loth, ke la kunveno esprimu varman aprobon por la eksiĝanta Estraro.

Sprawozdanie Komisji Rewizyjnej referuje pan Leon Ferencowicz, który stawia wniosek o udzielenie zarządowi absolutorjum. Wniosek przyjęto jednogłośnie (oklaski).

Po załatwieniu kilku spraw bieżących przystąpiono do wyboru nowego Zarządu, który przyjęto jednogłośnie w następującym składzie: Prof. Dr. Odo Bujwid - prezes, p.p. Jan Kostecki i Stanisław Karolczyk — wiceprezesi, p. Antoni Stankiewicz — sekretarz, p. Leon Ferencowicz — skarbnik, Dr. S. T. Karlsbad — bibljotekarz, p. p. W. Miernicki i E. Jaraczewski — zastępcy.

18-go lutego Polskie Towarzystwo Esperantystów wraz z Polskim Akademickim Towarzystwem Esperantystów rozpoczęło nanowo w roku bież. urządzać stałe literacko-esperanckie zebrania.

Po powitalnych przemówieniach wiceprezesa P. T. E. pana Jana Kosteckiego i pani Eugénie Cense, zabrał głos niedawno przybyły z Jugosławji nasz dzielny współideowiec p. Hohłow. Mówił o Jugosławji.

Mówić o kraju jest, przyznać należy, nader trudno, bo jedno z dwojga, albo trzeba zboczyć od właściwego tematu i mówić na jakiś specjalny temat np. o literaturze, lub też mówić o całości, lecz wtedy daje się przegląd, może ścisły, ale dla zwykłego słuchacza nieciekawy.

Raporton de la kontrolkomitato legas s-ro Leon Ferencowicz, kiu proponas entute aprobi raporton de la Estraro. La proponon oni unuanime akceptas (aplaŭdoj).

Post priparolo de kelkaj aktualaj aferoj oni alpaŝis al elekto de nova Estraro, kiun oni akceptis en sekvanta konsisto: Pro D-ro Odo Bujwid — prezidanto, s-roj Jan Kostecki kaj Stanisław Karolczyk —vicprezidantoj, s-ro A. Stankiewicz — sekretario, s-o L. Ferencowicz — kasisto, Dro. S. T. Karlsbad — bibliotekisto, s-oj W. Miernicki kaj E. Jaraczewski — anstataŭantoj.

La 18-an de februaro Pola Esperanto — Asocio kun Pola Studenta Esperantista Societo komencis denove en la kuranta jaro aranĝadi konstantajn literatur-esperantajn kunvenojn.

Post salutaj paroladoj de vicprezidanto de P.E.A. S-ro Jan Kostecki kaj de s-ino Eugenie Cense prenis la parolon alveninta antaŭ nelonge el Jugoslavujo nia brava samideano s-ro Hohlov. Li parolis pri Jugoslavujo.

Paroli pri lando estas, oni devas diri, tre malfacile, ĉar estas du alternativoj, aŭ oni devas deflankiĝi de la ĝusta temo kaj paroli pri ia specialaĵo ekz. pri literaturo, aŭ paroli pri la tutaĵo, sed tiam oni donas kelkan revuon, eble bonan, sed por ordinara aŭskultanto neinteresan.

Lecz sprawa tu przyjęła inny obrót. Pan Hohłow przedstawił całość Jugosławji z jej nader sympatycznym, szczególnie dla nas polaków, ludem, z jej malowniczością kraju szlachetnemi obyczajami i literaturą, nie zapominając jednocześnie o znaczeniu ekonomicznem i kulturalnem kraju. Całość przedstawił ten doskonały mówca w tak malowniczy i ciekawy dla słuchacza sposób, że gdy skończył, zaległa chwilowa cisza, obecni snadź oczekiwali, by echo odbiło jego piękne słowa.

W Polsce słyszało się nieco o serbach, nieco o kroatach, lecz o Jugosławji niewiele się wie. Z całą też przyjemnością dowiedzieliśmy się, jaką sympatją cieszymy się u jugosłowian, choć tak odległych od nas przestrzennie, tak jednak bliskich nas ideą, tak bliskich sercem.

O sympatji, jaką żywią dla nas jugosłowianie, niechaj zaświadczy fakt, że gdy zwłoki Henryka Sienkiewicza przewożono do ziemi ojczystej, wszystkie szkoły, wszystkie uczelnie były zamknięte. Świat jugosłowiański wyrażał swój hołd dla Wielkiego Polaka, swego współplemieńca.

Po śmierci Józefa Conrada, cenne dzieła tego wielkiego pisarza zostały przełożone na język jugosłowiański. Dlaczego? Dowiedziano się, że Conrad był polakiem.

Często jakiś odczyt lub prelekcja o kraju mniej dla nas

Sed la afero montriĝis alimaniere. S-ro Hohlov prezentis la tutaĵon de Jugoslavujo, kun ĝia tre simpatia, precipe por ni poloj, popolo, kun ĝia pitoreskeco de la lando, kun noblaj moroj kaj kutimoj, kun ĝia literaturo, ne forgesante samtempe pri la ekonomia kaj kultura signifo de l'lando.

La tutaĵon prezentis tiu bonega paroladisto en tiel pritoreska kaj interesa maniero por aŭskultantaro, ke kiam li finis, ekregis momenta silento, eble la ĉeestintoj atendis, ĉu eĥo ne resonigos ankoraŭ l'ajn belajn parolojn.

En Polujo oni aŭdis iom pri serboj, iom pri kroatoj, sed pri Jugoslavujo oni malmulte scias. Tial kun granda plezuro la aŭskultanturo sciiĝis kian grandan simpation ni ĝuas ĉe jugoslavoj, tiel teritorie malproksimaj de ni, tamen tiel proksimaj idee, tiel proksimaj al ni kore.

Pri la simpatio, kiun havas por ni jugoslavoj, atestu la fakto, ke kiam la korpon de Henryk Sienkiewicz oni veturigis la patrujan landon, ĉiuj lernejoj, ĉiuj gimnazioj estis fermitaj. La jugoslava mondo esprimadis sian homagion al la Granda Polo, sia samgentano.

Post morto de Joseph Conrad, famaj verkoj de tiu granda verkisto estis tradukataj en la lingvon jugoslavan. Kial? Oni sciiĝis, ke Conrad estis polo.

Ofte ia parolado aŭ prelego pri lando malpli por ni

znanym powoduje żywsze uderzenie tętna przyjaźni dla jego ludu. Mowa p. Hohłowa jest jednym z takich czynników łączących światy esperanckie Jugosławji i Polski.

Burza oklasków była nietylko podzięką dla prelegenta, lecz także zaakcentowaniem szczerej braterskiej sympatji dla naszych przyjaciół z Południa.

Po przemowie p. Hohłowa, która ciagle brzmi echem w sercach uczestników wieczoru i po licznych zapytaniach wniesiono herbatę, przy której na miłej pogawędce zastała obecnych północ.

Dn. 4. III. odbyło się drugie zebranie literackie. Przemawiała pani Eugenié Cense o naszych pierwszych kongresach powszechnych. Ta wybitna znawczyni Esperanta wszechstronnie omówiła te międzynarodowe zjazdy. Więc prócz najważniejszych postanowień kongresów i ich znaczenia, dała garść poetycko wyrażonych wrażeń, spowodowanych braterskiem uczuciem wszechludów, którego wynikiem będzie uświadomienie sobie, że przecież wszyscy ludzie tworzą „jedno wielkie rodzinne koło".

Po przemowie nastąpiły deklamacje nader udatne naszej młodej i zapalonej współideowczyni p. Kamilli Łagodzińskiej.

Miły wieczór zakończono odśpiewaniem hymnu „Espero"

konata kaŭzas pli viglan pulsobaton de amo por ĝia popolo. La parolado de s-ro Hohlov estas unu el la similaj faktoroj, kunigantaj la esperantistajn mondojn de Jugoslavujo kaj Polujo.

Varma aplaŭdego estis ne nur danko por la preleginto, sed ankaŭ akcentigo de sincera frata simpatio por niaj amikoj el la Sudo.

Post parolado de sinjoro Hohlov, kiu senĉese sonas eĥo en koroj de la aŭskultintaro kaj post multaj demandoj, oni alportis teon, ĉe kiu dum agrabla babilado venis la noktomezo.

La 4. III okazis dua literatura kunveno. Paroladis s-ino Eugenié Cense, pri niaj unuaj universalaj kongresoj. Tiu granda konantino de Esperanto ĉiuspece priparolis la internaciajn kunvenojn. Do, krom la plej gravaj decidoj kongresaj kaj ilia signifo, ŝi donis iom da poete esprimitaj impresoj, kaŭzitaj de l' fratsento de ĉiuj popoloj, kies rezultaĵo estos konsciiĝo, ke ĉiuj homoj ja formas „unu grandan rondon familian."

Post la parolado sekvis tre sukcesaj deklamoj de nia juna kaj fervora samideanino s-ino Kamilla Łagodzińska.

La agrablan vesperon oni finis per himno „Espero".

Dn. 11. III. odbyło się trzecie zebranie. Przemawiał pan Hohłow n. t. „O esperanckich poetach Baghy'm i Kalocsay'u". Obecni zapoznali się z tak mało znaną a bogatą esperancką poezją. Utwory tych dwóch doskonałych poetów, tak różnych sobie reprezentują całokształt esperanckiej poezji, z jednej strony widzimy trubadura, z drugiej śpiżowy bronz poezji.

Potem zabrał gło jeden z pierwszych pionierów naszej idei, poeta esperancki p. Leo Belmont, który ze wzruszeniem wyraził swe wrażenia oraz podziękował gorąco p. Hohłowowi za prawdziwie artystyczną ucztę.

Zebranie zakończono, jak zwykle, hymnem.

Młodzi współideowcy zrozumieli jakim sposobem powiększyć możemy szeregi naszej pokojowej armji. Oto wydział Prasowy przy Polskim Akademickim Tow. Esperantystów zdobył ostatniemi czasy pismo akademickie „Nurt".

Ten nader poważny organ młodej demokracji polskiej jest jakoby Djogenesem, który w powodzi nieuczciwości, wśród przekonania, że per fas et nefas dążyć należy do urzeczywistnienia swych partyjnych dążeń, dzierży śmiało lampę szlachetności w jakimkolwiek działaniu.

Hasło jego jasne i czyste: „Interesy etnicznej grupy polskiej są o tyle tylko rzeczywiste, o ile nie popadają w ko-

La 11. III. okazis tria kunveno. Paroladis s-ro Hohlov je temo: „Pri esperantaj poetoj Baghy kaj Kalocsay." La ĉeestintaro konatiĝis kun tiel malmulte konata kaj riĉa esperanta poezio. La verkoj de tiuj du bonegaj poetoj, tiel malsamaj, reprezentas tutaĵon de esperanta poezio, unuparte trubadurecon, aliparte ĝian bronzon.

Poste prenis la parolon unu el unuaj pioniroj de nia ideo, esperanta poeto s-ro Leo Belmont, kiu kortuŝite esprimis siajn impresojn kaj dankis s-ron Hohlov por vere artista festeno.

La kunvenon oni finis, kiel kutime, per la himno.

Junaj samideanoj ekkomprenis kiamaniere ni povas pligrandigi vicojn de nia paca armeo. Jen lastatempe Gazetara Fako ĉe Pola Studenta Esperantista Societo akiris studentan gazeton „Nurt".

Tiu tre serioza organo de juna demokratio pola estas kvazaŭ Diogeno, kiu inter malhonesteco, inter opinioj, ke per fas et nefas oni devas celi al efektivigo de siaj partiaj penoj, tenas kuraĝe la lampon de nobleco en kiu ajn ago.

Ĝia programo estas klara kaj pura: „La aferoj de etnika grupo pola estas nur tiam efektivoj se ili ne kolidas kun

lizję z dobrem państwa polskiego, podobnie jak dobro państwa polskiego o tyle nie jest fikcyjne, o ile nie jest sprzeczne z interesem ludzkości".

Myśl przewodnia „Nurtu" przedziwnie harmonizuje z ideją esperancką.

Dlatego nic dziwnego, że Redakcja oddała ochoczo Wydziałowi Prasowemu jedną stronę swego pisma do redagowania artykułów i wiadomości z życia esperanckiego. Już w Nr. 2-3 ukazał się dział pod tytułem: „Ruch esperancki" z artykułem „O język międzynarodowy" p. Mieczysława Trochimowskiego. Odtąd wszyscy polscy studenci dowiadywać się będą o rozwoju naszej sprawy. Słusznie rozpoczęto propagować naszą ideę wśród młodzieży, bowiem w jej rękach spoczywają losy przyszłości.

Niedawno ukazała się książka p. t. „Sprawa między dwoma trupami" p. Leo Belmonta. Autor jest jednym z nielicznych esperantystów, którzy w zaraniu istnienia Esperanta dopomagali mistrzowi w tworzeniu ruchu. P. Leo Belmont, były wiceprezes Polskiego Tow. Esperantystów, obecny jego honorowy członek, w książce swej podaje ciekawą swą autobiografję, w której niepoślednie miejsce zajmuje sprawa i ruch esperancki.

24-go lutego odbyło się uroczyste otwarcie czytelni gazet przy „Akademickim Ko-

bono de l'pola ŝtato, simile kiel bono de l'ŝtato pola ne estas tiam fikcia, se ĝi ne kontraŭstaras la intereson de l'tuthomaro"

La ideo de „Nurt" perfekte harmonias kun la esperanta ideo.

Tial ne estas mirinde, ke la Redakcio oferis volonte al la Gazetara Fako unu paĝon de sia gazeto por redaktado de artikoloj kaj informoj el esperantista vivo. Jam en n-ro 2-3 aperis aparta fako sub titolo: „Esperanto - movado" kun artikolo „Por lingvo internacia" de s-ro Mieczysław Trochimowski. De nun ĉiuj polaj studentoj sciiĝados pri progreso de nia afero. Oni ĝuste komencis propagandi nian ideon inter la junularo, ĉar en ĝiaj manoj estas la sorto de l'estonteco.

Antaŭ nelonge aperis libro s. t. „Sprawa między dwoma trupami" de s-ro Leo Belmont. La aŭtoro estas unu el nemultaj esperantistoj, kiuj ĉe komenco de ekzistado de Esperanto helpis la majstron en kreado de l' movado. S-ro Leo Belmont, estinta vicprezidanto de Pola Esperanto - Asocio, nune ĝia honora membro, en sia verko donas interesan aŭtobiografion, en kiu nelastan lokon okupas ideo kaj movado esperanta.

La 24-gn de februaro okazis solena malfermo de gazetlegejo ĉe „Akademia Espe-

le Esperantystów". W uroczystości wzięło udział wraz z zaproszonymi przedstawicielami miejscowych towarzystw przeszło 30 osób.

Zebranie zagaił prezes koła p. Stanisław Folman, który w krótkiej przemowie uzasadnił potrzebę czytelni, oraz zaprosił gorąco wszystkich esperantystów, by często odwiedzali gościnne podwoje.

Potem przemawiali w imieniu Polskiego Towarzystwa Esperantystów p. Eugénie Cense, w imieniu Międzynarodowego Stowarzyszenia Studentów Esperantystów p. Mieczysław Trochimowski, w imieniu Polskiego Akademickiego Towarzystwa Esperantystów p. Tadeusz Grabowski oraz w imieniu Stowarzyszenia „Praca" (Laboro) zawsze krytycznie nastrojony p. Ignacy Koss.

Częstochowa.

Prowincja również zaczyna żywo pracować, oto w Częstochowie po rozwieszeniu afiszów propagancyjnych, wydanych przez Polskie Akademickie Tow. Esperantystów zapisało się na kurs zorganizowany przez tamtejszego czynnego delegata Powszechnego Związku Esperantystów (U. E. A.) p. Józefa Grygosińskiego, 100 osób. W tej liczbie znajduje się 9 nauczycieli, 26 urzędników, 5 studentów, 5 policjantów, jeden dziennikarz i t. p.

rantista Rondo". En la malfermo partoprenis kune kun reprezentantoj invititaj de ĉiuj lokaj societoj pli ol 30 personoj.

La kunvenon komencis prezidanto de la Rondo, s-ro Stanisław Folman, kiu en mallonga parolado pruvis bezonon de la legejo kaj invitis varme la esperantistaron ofte viziti la gastaman sidejon.

Poste parolis en la nomo de Pola Esperanto - Asocio s-ino Eugénie Cense, en la nomo de Internacia Studenta Esperantista Asocio s-ro Mieczysław Trochimowski en la nomo de Pola Studenta Esperantista Societo s-ro Tadeusz Grabowski, kaj en la nomo de societo „Laboro" ĉiam kritikeme agordita s-ro Ignacy Koss.

Częstochowa.

La provinco ankaŭ komencas vigle labori. Jen en Częstochowa post disgluado de propagandaj murafiŝoj, eldonitaj de Pola Studenta Esperantista Societo enskribiĝis je kurso organizita de tiea agema delegito de Universala Esperanto-Asocio, s-ro Józef Grygosiński, 100 personoj. En tiu nombro estas 9 instruistoj, 26 oficistoj, 5 studentoj, 5 policistoj, 1 ĵurnalisto k. t. p.

Cieszyn.

Miejscowy energiczny delegat Powsz. Zw. Esper. (U.E.A) p. Ludwik Krysta wydatnie propaguje Esperanto przez afisze oraz wzmianki w miejscowej prasie. Sukces był wielki: na otworzone bezpłatne kursa, zapisało się 123 uczestników.

Lwów.

Ruch ożywił się tutaj również. Dn. 14. II. b. r. odbyło się roczne zebranie Towarzystwa Esperanto (Towarzystwo Esperanto, Izba Handlowa, ul. Boularda 5), podczas którego wybrano nowy zarząd: prezes p. H. Wierzchowski, sekretarz p. H. Schnützer. Często ruch ogranicza się tylko do wyboru nowego zarządu, lecz we Lwowie jest inaczej. P. Wierzchowski prowadzi już dwa kursy, następnie pozyskano „Gazetę Poniedziałkową", która obecnie podaje liczne artykuły o Esperancie. Dalej p. Schnützer miał odczyt p. t. „Esperanto a Radjotelefonja".

Kierownik działu:
M. Trochimowski.

Cieszyn.

La loka energia delegito de U.E.A. s-ro Ludwik Krysta efike propadandis Esperanton per murafiŝoj kaj pere de loka gazetaro. La sukceso estis granda: por malfermitaj kursoj senpagaj enskribiĝis 123 partoprenantoj.

Lwów.

La movado ĉi-tie ankaŭ reviglîĝis. La 14. II. k. j. okazis jarkunveno de Societo Esperanto (Societo Esperanto, Komerca Ĉambro, Boularda str. 5), dum kiu oni elektis novan estraron: prezid. s-ro H. Wierzchowski, sekr. s-ro H. Schnützer. Multafoje la movado estas limigata nur je elekto de nova estraro, sed en Lwów estas alie. S-ro Wierzchowski gvidas jam du kursojn, plue oni akiris „Gazeta Poniedziałkowa", gravan presorganon, kiu nun aperigas multajn artikolojn pri Esperanto. S-ro Schnützer faris paroladon je temo: „Esperanto kaj Radiofonio".

Fakredaktoro:
M. Trochimowski.

Miesiąc esperancki.

Mamy do zanotowania następujące tegoroczne **kongresy esperanckie lokalne**:

XIV kongres esperantystów belgijskich odbędzie się podczas Zielonych Świątek w Verviers, mieście położonem w najbardziej godnej widzenia okolicy Belgji;

XIV kongres esperantystów w Niemczech odbędzie się podczas Zielonych Świątek w Magdeburgu;

XII kongres K. E. F. (katalońskiej federacji esp.) odbędzie się w Palmie na wyspie Majorce, 21—24 Maja;

III. kongres hiszpańskich esperantystów w Kordobie w Andaluzji (10 — 12 Maja);

VII. kongres węgierskich esperantystów w Budapeszcie, 31 Maja i 1-go Czerwca;

XVI. kongres esperantystów angielskich podczas Zielonych Świątek w Leamington Spa.

V-ty międzynarodowy esperancki **kongres robotniczy** będzie miał miejsce w Wiedniu, termin jeszcze nie oznaczony; poprzednie kongresy odbywały się pod patronatem honorowego prezydjum, w skład którego wchodzili: prof. Einstein, Henry Barbusse, Romain Rolland i E. Toller.

Po porozumieniu się z Międzynarodowym Uniwersytetem, założonym przez Otleta i Lafontaina w Brukselli, odbędzie się w Genewie **Esperancki tydzień uniwersytecki**, od 1 — 7 Sierdnia. Znani profesorowie będą mieli prelekcje w języku Esperanto z dziedziny prawa międzynarodowego, filozofji, filologji, historji Esperanta, pedagogji i psychoanalizy. Z dwóch ostatnich dziedzin odbędą się odczyty znakomitych psychologów Pierre Bovet'a i Charles Baudoin'a.

Esperancki Komitet Centralny ustalił dla wszystkich krajów jednakową opłatę na Kongres w Genewie: 25 franków szwajcarskich. Członkowie U. E. A., o ile składkę regularnie opłacają, otrzymują rabat 20 proc., młodzież poniżej 20 lat, należąca do U. E. A., płacić będzie 15 franków.

X. Katolicki Kongres Esperantystów, zgodnie z zawiadomieniem „Espero Katolika", odbędzie się w Paryżu (13 — 16 sierpnia). Jednym z tematów, które będą rozpatrywane, to sprawa prasy katolickiej na terenie wszechświatowym. Redakcja „Fspero Katolika" prosi wszystkich mogących ofiarować współpracę o opracowanie referatu, tyczącego się ich kraju i narodowości. Poza tem zawiadamia o pielgrzymce do Lourdes, która wychodzi z Paryża 19-go i powraca 25 Sierpnia. Przyjmujący więc udział we wszechświatowym Kongresie w Gienewie mogą na powrotnej drodze odwiedzić Paryż, Lourdes i korzystać ze wszystkich zniżek opłat kolejowych, paszportowych, wizowych, hotelowych i t. p. O informacje zwracać się należy do: F-ino Larroche, X Katolika Esperanto Kongreso, 55 Rue de Vaugirard, Paris VI.

Redakcja „Espero Katolika" przesyła rodzinie Zamenhofów kondolencje z powodu śmierci D-rowej Klary Zamenhofowej.

W numerze 11 — 12 „Belga Esperantisto“ ukazał się skrót pięknej mowy Leo Belmonta na pogrzebie Klary Zamenhof.

W Magdeburgu liczba **dzieci szkolnych**, które zapragnęły uczyć się Esperanta, **wzrosła do 1400**. Magistrat miasta Magdeburga zorganizował 2 kursy dla 60 nauczycieli, którzy uczą się Esperanta dla celów nauczania tych dzieci, pod kierownictwem kolegów swych Wottricha i Rockmana.

GAZETOJ KAJ LIBROJ.

Amerika Esperantisto (5). Aŭstria Esperantisto (1). Arguso (Novembro-Decembro). Arbeider Esperantisten (1-2). Belga Esperantisto (11-12). The British Esperantist (238). Brazila Esperantisto (9-12). Bulteno de Antverpena poresperanta Komitato (1). Espero Katolika (5-6). Experimental Wireless (February Nr. 17). Espero Teosofia (1). Germana Esperantisto (1-2). Heroldo de Esperanto (4, 5, 6, 7, 9, 12, 13, 14, 15). Hungara Esperantisto (1, 2). Informoj de Esperanto Asocio de Estonujo (1. 2). International Language (1). Interligilo de l'P. T. T. (3) Jarlibro de Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio (1924). Kataluna Esperantisto (7-8). Literaturo (24). Literatura Mondo (Januaro, Februaro, Marto). Le Monde Esperantiste (Novembro, Decembro). La progreso (2-3). Reklamo (1, 2). Revista del Ateneo (6, 7). Svenska Arbetar Esperantisten (1). La Suno Hispana (90, 92). Ls Suda Kruco (54-55). Svenska Esperanto Tidningen (1, 2). La Semisto (45, 46).

Connor Germany Esperanto Konversacia Libro. Hirt: Esperanto Taschenwörterbuch. Frederik Tuglas: Kvin Noveloj. Oomoto (la nova spirita movado).

SPROSTOWANIE.

W Nr. 111|112 „Esperantysty Polskiego“ w „Sprawozdaniu Zarządu Centralnego Polskiego Tow. Esperantystów za rok 1924“ na str. 3-ej, wśród uczestników XVI Kongresu w Wiedniu mylnie podano nazwisko p. Józefa Bacewicza z Wilna, który w kongresie tym nie brał udziału, a natomiast opuszczono nazwisko p. Romana Sakowicza, Prokuratora z Wilna, co niniejszem śpieszymy sprostować.

REDAKCJA.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Redakcio kaj Administracio: Warszawa, Widok 19.

Funkcias nur merkrede kaj vendrede de 7 ½ ĝis 9 h. vespere.

„Roczniki Katolickie"

wydamy w styczniu 1925 r. po raz trzeci, tym razem za rok 1924. Zachęcają nas do tego życzliwe listy biskupów polskich oraz rozliczne przychylne recenzje, z których przytoczymy choćby „Dnia Polskiego" (Warsz. z 13. IX. 24): „X. C. jako kronikarz posiada dwie cenne zalety, formalną i moralną, pisze stylem bardzo żywym i barwnym, choć pełnym prostoty i w ocenie zjawisk jest sprawiedliwym tj. przy całej swojej wierze i gorliwości katolickiej nie jest fanatycznym".

„*Roczniki Katolickie*" są u nas potrzebne ze względu na budzące się uświadomienie katolickie.

„*Roczniki Katolickie*" są wprost konieczne ze względu na pierwszorzędne stanowisko, jakie Polska zajmuje czy zająć powinna w pochodzie katolicyzmu.

„*Roczniki Katolickie*" są wprost niezbędne ze względu na budzący się i tężejący katolicki ruch społeczny.

„*Roczniki Katolickie*" są pewnym, bo opartym o literaturę opisanego narodu, informatorem o współczesnym ruchu katolickim nietylko w kraju, ale i zagranicą: dla księży, nauczycieli, posłów, redaktorów i wogóle wszystkich, mających serce wrażliwe i umysł otwarty na sprawy Kościoła.

„*Roczniki Katolickie*" są i przyjemnym towarzyszem, bo „skrzętność wielka w zebraniu szczegółów wraz z artystycznem ich ułożeniem, styl żywy, piękny, nieraz barwny sprawia, iż książkę czyta się z podobnem zajęciem, jakie towarzyszy lekturze francuskich tego rodzaju „Rapports" czy „Comptes-rendus" („Głos Narodu" 1923, Nr. 149)." —

Cena rocznika będzie wynosić ok. 8 zł. Objętość około 500 stron. Ciągle jeszcze można się zgłaszać na listę abonentów; im więcej ich będzie, tem tańsze będą „Roczniki" i tem pewniejsze ukazywanie się i w przyszłych latach. Abonenci płacą tylko 2/3, klerycy i studenci 1/2 ceny. Abonentów, którzy zmienili swoje miejsce pobytu, uprasza się o *podanie adresu*, by zapobiec kosztom i nieporozumieniom. Pieniędzy nie potrzeba wpłacać, ściągnie się je przy odesłaniu książki przez zaliczkę.

Adres redakcji i administracji „Roczników Katolickich":

X. Nikodem Cieszyński — Poznań.

W. Szan. PP. Autorów i Nakładców uprasza się o łask. przesyłanie dzieł z zakresu zagadnień religijnych, uczyni się o nich wzmiankę w „Roczn. Kat."

Pola Esperanto Asocio

Plej malnova kaj plej granda Esperantista Organizo en Polujo.

Agadrajto sur la tuta teritorio de la Respubliko.

Grupoj kaj Membroj-Korespondantoj en preskaŭ ĉiu granda pola urbo.

La agado de la Asocio kaj la „Poznanja Deklaro", deviga por ĉiuj membroj, pruvas, ke la Asocio zorgas ne nur pri la propagano de Esperanto, sed ankaŭ ne forgesas pri pola propagando eksterlande. Ĝi kunigas Polujon kun la granda Rondo Familia de Popoloj en la senco de reciproka ekkono kaj simpatio.

Ĉiu Esperantisto, ĉiu Esperanta Grupo, al kiu niaj idealoj, al kiu la potenco kaj unueco de nia landa morado estas karaj

ALIĜU TUJ AL POLA ESPERANTO ASOCIO!

Jara kotizo kaj enskribo Zł. 7. — Por Membroj — Subtenantoj Zł. 19. —

Uzu la aliĝilon, kiu troviĝas sur lasta paĝo de tiu-ĉi numero!

La granda intereso por ĈES-adresaro instigis nin aperigi

tute senpage

la nomon kaj adreson de ĉiu samideano kiu vere intencas interkonatiĝi kun la tuta mondo.

Aliĝojn bonvolu sendi tuj al

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Servo

Praha II., Žitná 44.,

kiu eldonos ĈES-adresaron komence de la nova jaro.

Skribu legeble!

Varbu interesatojn!

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Presejo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Pańska 60.